







G.L. GHELLI

ITALIA

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti

ferroviista



COMUNICATO DEL CASSIERE

Ancora molti dei nostri Soci non hanno versato la quota per l'anno 1971 e qualcun non ha pagato la quota per l'anno 1970 già trascorso.

Si pregano di nuovo vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali, e continuano a ricevere il presente bollettino, di inviare con urgenza le quote per l'anno 1970, da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti, oppure trasmettere le loro dimissioni per non far pagare, anche per il 1971, le loro adesioni alle suddette Associazioni.

Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega il bollettino di versamento nel C.C.P.n°8/24094 intestato all'IFEA, Via Donato Creti, 61 I-40128 Bologna.

23-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTOKONGRESO

MARIBOR (Jugoslavio) - 15-a ĝis 21-a de majo 1971-a

Konstanta adreso: 23-a Kongreso de I.F.E.F. 62-000 MARIBOR, Jugoslavio.

Postĉekkonto: 518-679-21063 Fervojoista Esperanto Societo Maribor.

Bankkonto: 518-620-1-32002-10/181 KB Maribor, Jugoslavio.

KONGRESKOTIZO: Ĝis 31-1-1971: 100 dinaroj (8 Usonaj dolaroj), post 31-1-1971: 125 dinaroj (10 Usonaj dolaroj).

Familiano, pensiulo, junulo ĝis 21 jaroj pagas duonon.

Simbola aliĝo: 25 dinaroj (2 Usonaj dolaroj).

KELKAJ INFORMOJ PRI LA LOĜADO

Prezoj de la ĉambroj en hoteloj de kategorio "B" estas: unulitaj de 34 ĝis 40 din. dulitaj de 52 ĝis 68 din. trilitaj de 80 ĝis 84 din. Kompletaj pensionoj 62-72 din. En hotelo "Slavija" (ankaŭ kat."B"): kompleta pensio kostas 110 din.

Pro la manko de disponeblaj ĉambroj en la urbo mem, ni - verŝajne - estos devigataj enloĝigi iom da kongresanoj ekster la urbo. Prezoj en motelo "Jezero" kaj sur la monto Pohorje, atingiblaj per aŭtobusoj kaj kablofervojo, estas pli malaltaj.

Prezoj de ĉambroj en privataj kaj studentaj domoj estas 10-15 din. sed la nombro estas limigita.

KONGRESA KARTO: La kongresa karto pri nia 23-a IFEF-Kongreso en Maribor validas ankaŭ kiel senpaga fervoj-bileto por vojaĝi unuaklase tra Jugoslavio dum la tuta monato majo 1971-a. Tiu favoro fare de Ĝenerala Direkcio de Jugoslavaj Fervojoj, validas nur por kongresanoj aktivaj kaj pensiulaj fervojistoj kaj iliaj gefamilianoj, ne por eventualaj turistoj aliĝontaj al la kongreso.

KIEL ATINGI MARIBOR: Oni povas atingi la kongresurbon, fervoje de Italio, tra: Villaopicina (antaŭe Poggioreale del Carso), Pivka, Ljubljana, Zidani Most, Celje, Pragersko, Maribor. Oni povas atingi ĝin ankaŭ tra Aŭstrio, de Tarvisio tra Villach, Bruck, Graz, Spielfeld-Strass, Mariboro, aŭ rekte de Villach tra Bielberg, Prevelje, Maribor, trairente Klagenfurt.

INFORMAZIONE PER GLI ITALIANI: Tutti coloro che intendono partecipare al 23° IFEF-Kongreso a Maribor possono inviare "aliĝilo" e quote direttamente alla Segreteria dell'I.F.E.A. in lire italiane (in ragione di £. 52 ogni dinaro), che penserà all'inoltro.

56-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

LONDONO, 31-a de julio ĝis 7-a de aŭgusto 1971-a.

SUB LA ALTA PROTEKTADO DE LA LORDURBESTRO DE LONDONO SIR PETER STUDD.

Kongresejo: University College Londono. INAŬGUREJO: Royal Festival Hall.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176 ROTTERDAM - 3002, Nederlando.

La Alta Protektanto enoficiĝis: La 14-an de novembro Sir Peter STUDD enoficiĝis kiel 643-a Urbestro de Londono. Dum la ceremonio Sir Peter Studd, kiu elektis kiel temon por sia oficjaro "komunikado" kun la slogano "Vokas Londono", klarigis: "Mi deziras diskonigi ideojn kaj pli bonan interkompreniĝon, kaj pri tio vere temas la interhoma komunikado".

Kotizo: La kongresa kotizo inkluzivas la tutan programon de la Kongreso, escepte de aranĝoj aparte pagendaj. Ĝi devas esti antaŭ pagita kaj ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos la kongreson. Tion bonvolu konsideri precipe tiuj personoj, kiuj pagas kotizon por aliaj kongresanoj.

"Jen Londono": "Jen Londono estas la titolo de la libro pri la sciindaĵoj de Londono, kiun oni tradukis en Esperanton kaj kiu aperos en bone konata serio "Ladybird": ĝi estos havebla por la kongresanoj en 1971-a.

"Tiom por vidi" kaj "tiom por fari (kaj tiom por memori!)" en Londono '71" heroldas la violkolora reklamilo de 56-a U.K., eldonita de L.K.K. sur ledpapero de formato 118 x 168 mm. Senpagaj ekzempleroj por reklamaj celoj estas haveblaj ĉe U.E.A.

La Londona buso ankaŭ sur poŝtkarto: Aperis speciala poŝtkarto okaze de la 56-a U.K., bildiganta la konatan Londonan aŭtobuson laŭ originala desegnaĵo de K.T. Bartoŝik. La prezo de 5 ekzempleroj estas 1 guldeno plus sendkosto. Mendoj ĉe U.E.A.

Statistiko: (4-12-1970) entute aliĝis 317 personoj el 28 landoj.

44-a KONGRESO DE S.A.T. (Parizo 31/7 - 6/8/1971-a)

La aliĝkotizoj estas 40 Fr.Fr. por membroj, 67 Fr.Fr. por gastoj, ĝis la 31-3-71 (speciala tarifo por junuloj de 15 ĝis 20 jaroj: 25 FF. por SAT junuloj kaj 35 FF. por junaj gastoj). Rabato por familianoj (5 FF. por ĉiu familiano). Senpaga aliĝo por infanoj. Ekskursoj al la keloj de Reims kaj al Kastelo de Versailles.

Informoj ĉe SAT, 67, avenue Gambetta - Paris (20°).

"PROSPETTIVE DI UNA LINGUA MONDIALE"

Estas la temo pritraktita fare de Prof. Mario Pei (de la Universitato de Nova Yorko) dum dissendo ĉe la itala radio (III-a programo). Prof. Pei esperas ke esperanto estu utiligota en la internaciaj rilatoj.

La teksto de la prelego estas havebla senpage petante ĝin je ĉi tiu adreso: "Voce dell'America", via Buoncompagni, 2 - Roma - citu la tekston n.993.

N I L E G I S

"FAMIGLIA CRISTIANA" - La semajna itala revuo "Famiglia Cristiana" (Kristana Familio) kiu havas 8 milionojn da legantoj, dediĉis gravan artikolon kun multaj fotoj al nia samideano Nikola Rytjkov, fama aktoro, rusdevena nun laboranta en Londono, kies recitadon, la aŭtoro de la artikolo aŭskultis sur la ŝipo "Caribia" dum la Itala Krozad-kongreso tra Mediteraneo.

"IL VALORE EDUCATIVO DELL'INSEGNAMENTO DELL'ESPERANTO NELLE SCUOLE": Eld. I. I. E. kaj F. E. I.: verkis R. Markarian, tradukis N. Dell'Aringa, finredakto de C. Minnaja; 1970.

Estas grave, ke dum 1970-a, la internacia eduka jaro, oni aperigis studon pri la neniam sufiĉe rekonata eduka valoro de Esperanto-instruado en la lernejoj.

La studo estas de R. Markarian estro de angla lernejo kaj Prezidanto de I. L. E. I.

La verko estas taŭga por doni sufiĉe precizajn informojn al la personoj, kiuj ne bone konas la problemon, kaj en ĝi estas entenataj la respondoj al la plej modernaj problemoj de la interkompreniĝo de la popoloj pere de moderna, logika, facila, teknika ilo. Ege valora estas ankaŭ la montro, ke Esperanto utilas por studado de aliaj lingvoj, kiel ponto-lingvo; precipe post la rezultoj de eksperimenta instruado ek de la elementaj lernejoj. En la simpleco de sia strukturo la verko estas prezentata sur scienca bazo kaj laŭ la plej modernaj pedagogiaj principoj kaj ĝi atingas la deziran celon de informado serioza kaj sufiĉe profunda ne nur por nekompetentulo sed ankaŭ por spertulo pri pedagogiaj problemoj.

"LA VIE DU RAIL" - Ankaŭ tiu grava revuo de Francaj Fervojoj publikigis tutpaĝan artikolon kun fotoj pri nia Kongreso en Rimini, kaj specimenon de aliĝilo al F.F.E.A. (Francaj Fervojista Esperanto-Asocio). La verkinto estas nia kolego Bernier.

Ni ricevis lastatempe aliajn du gazetojn kun artikoloj pri la Kongreso en Rimini: LA LANTERNO - Sendependa Internacia Gazeto (Eldonejo Lanterno Postfach 473 D-8000 Munchen-25), raportas sur la unua paĝo pri la Kongreso de la strikoj, per artikolo de nia amiko Willi Barnickel nomita "La arto improvizi".

SVISA ESPERO - Oficiala Organo de Svisa E-Societo (Redaktoro Claude Gacond, Miéville 133 CH-2314 LA SAGNE), entenas artikolon kaj foton pri la partopreno de la Svisaj kolegoj al la kongreso de Rimini, verkita de kolego Hans Hunkeler.

"DER ESPERANTIST" n-ro 40/41 Majo 1970 - Organo de E-Movado en Germana Demokratia Respubliko. La ĉefa parto de la gazeto estas dediĉita al Lenin-a datreveno 1870-1970, cent jaroj de lia naskiĝo. Krom la kutimaj lingvaj rubrikoj, precipe la daŭrigo de la komplementa vortaro; estas tre interesa la rubriko "Internacia lingvo kaj Filatelo" kiu ĝojigos ĉiun poŝtmarkkolektanton.

P A C O - n-ro 7-8/1970 - Oficiala Organo de la Mondpaca Esperantista Movado (M.E.M.) Eldono de la Germana Demokratia Respubliko (G.D.R.). Interesaj artikoloj pri la lasta mondmilito, precipe pri koncentroj, kaj pri la nuntempaj militoj, montras la abomenon kiu okazas kiam homo malamas kaj perfidas homon.

Vere interesa artikolo historias kaj komparas diversajn lingvojn, ĝustigante la elekton de Esperanto inter ili. La arta parto estas preskaŭ tute regata de Bertol Brecht kies dramo "La du filoj" estas longe recenzita.

HOMO KAJ KOSMO - Populara Naturscienca E-Revuo. Eldonisto: Astronomia Observatorio de la Kroata naturscienca societo Zagreb. La lasta numero de Homo kaj Kosmo, la fama naturscienca jugoslava revuo vere interesis nin per raporto pri la studoj de lungrundo alportita de "Apollo 11" kaj per prelego pri materio kaj antimaterio.

LENIN KAJ LA REVOLUCIA MOVADO EN LATVIO - La Komisiono pri internacia ligo de Latviaj esperantistoj eldonis okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de Lenin, libreton kiu montras lian grandan kontribuon al la revolucia movado en Latvio.

La sama Komisiono aperigis ankaŭ alian broŝuron pri la eniro de Latvio, post la dua mondmilito, en la Unuiĝon de Sovetaj Respublikoj.

STUDENTA SCIENCA RONDO - Somero 1970-a. Ankaŭ la studentoj de Pola Universitato en TORUN' presis informilon pri sia agado kaj precipe pri Esperanta Seminario dediĉita al la pensoj kaj al la ago de Lenin, okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo.

"KULTURAJ KAJEROJ" - Alportas interesajn legaĵojn, kaj novaĵojn de la Esperantista Kulturdomo "GRESILLON" F-49 BAUGE - Francujo. Pronumero kontraŭ respond-kupono.

P O H O R J E
=====

La ekskursloko de la 23-a I.F.E.F.- Kongreso en Maribor

Pohorje estas montaro, kiu etendiĝas okcidente de Maribor en longeco de 60 kaj larĝeco de ĝis 30 km. Ĝi estas stakforma montoĉeno sen abruptaj deklivoj, ĝia kurba montsurfaco estas ege larĝa kaj preskaŭ ebena, alta de 1000 ĝis 1500 m., tute kovrita per miksitaj konifer- kaj foli-arbaroj, unu parto estas eĉ praarbaro kaj nacia parko kun protektita bestaro. Kelkaj naturaj senarbaraj aŭ eltrunkiĝitaj deklivaj surfacoj servas dumvintre kiel agrablaj kaj oportunaj ski-terenoj kun multegaj tir- kaj seĝ-liftoj. Ĉie troviĝas tre ĉarmaj kaj sufiĉe komfortaj montaraj hoteloj kaj alpaj domoj kun centra hejttigado kaj varma akvo en la ĉambroj. Ilia situo estas elektita tiel, ke ĉiu domo havas belan kaj vastan panoramon. Ĉiuj lokoj kaj partoj estas laŭlonge kaj laŭlarĝe ligitaj per tre bonaj vojoj kaj ŝoseoj, kiuj servas al turistoj kaj ankaŭ por ekspluatado de ligna riĉeco. Pohorje apartenas al la plej malnova alpa strio, ĝi konsistas el granito, kvarco kaj gnejs, tra kiuj ne penetras la akvo. La sekvo de tio estas, ke oni povas trovi tute supre malgrandajn lagojn kaj marĉojn.

Sur Pohorje oni povas veturi per regulaj aŭtobusoj kaj per gondollifto. La veturtempo el la urba centro ĝis la supro de la Maribor-a parto de Pohorje estas 30 min.

La bonegaj kaj mondkonataj ski-terenoj de Pohorje allogas dumvintre multegajn sportistojn, ĉiuvintre okazas tie ankaŭ la famaj FIS-A slalomkonkursoj en kiuj partoprenas la skianta elite el ĉiuj kontinentoj. Dumsomere servas la domoj kiel tre agrablaj, freŝ- kaj bon-aeraj, trankvilaj kaj malmultekostaj somerrestadejoj.

Pro tiuj kaj aliaj avantaĝoj la L.K.K. esperas, ke multaj kongresanoj tre volonte deziros loĝi en kelkaj pli proksimaj hoteloj-domoj sur Pohorje.

Ludoviko Prebil

NOVAJ BROŜUROJ KAJ FALDFOLIOJ EN ESPERANTO
=====

BONAN VOJAĜON PER TRAJNO - Bunta tridek-paĝa broŝuro eldonita de la Ŝtataj Finnaj Fervojoj por proponi diverstipajn rondvojaĝojn tra la lando.

Ĝi entenas fervojmapon de Finnlando, multajn kolorfotojn kaj orarojn kaj prezojn de la diversaj rondvojaĝoj proponitaj.

RAVENNA - Nova eldono (la kvara) de la poŝformata 32-paĝa libreto kun multaj fotoj kaj mapoj kiuj ilustras la mirindaĵojn de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Eldonis Azienda Autonoma di Soggiorno e Turismo, Via XIII Giugno, 2 RAVENNA.

HANOVRO - Esperantlingva faldfolio kun multaj koloraj bildoj kaj granda kaj detala mapo de la urbo. Enhavas ankaŭ detalajn informojn pri la vidindaĵoj.

Mendu ĉe: Trafikoficejo Verkehrsbüro, Ernst-August-Platz, 8 HANOVRO (Germanio)

DARMSTADT - Verdkolora Esperantlingva faldfolio aldonita al la Germanlingva prospekto. Entenas inviton de Germana Fervoĵista Asocio, al ĝia 14-a Jarkunveno en Darmstadt la 10-an kaj 11-an de oktobro 1970-a. Turnu vin al D-ro Wilhelm LANG, Fuchshohl, 98, D-6 FRANKFURT/M-50 (Germanio).

MARIBOR - Niaj kolegoj de la L.K.K. de la venonta 23-a IFEF-Kongreso, krom la esperantlingva teksto aldonita al bunta plurlingva faldfolio pri Maribor, eldonis alian faldfolion: "Maribor invitas kaj atendas vin", kiu enhavas la bonvenon de la Urbestro de Maribor kaj la provizoran programon de la Kongreso. Mendu amase ĉe: 23-a Kongreso de I.F.E.F., YU-62-000 MARIBOR (Jugoslavo).

IMITINDA INICIATO

=====

Niaj Francaj kolegoj eldonis libreton por propagandi nian lingvon kaj nian fervoĵistan movadon, titolitan: "Pourquoi pas vous?". Tiu ĉi libreto koncize donas informojn pri Esperanto kaj pri organizo de F.F.E.A.. Ĝi donas ankaŭ kelkajn nociojn pri Esperanto kaj enhavas aliĝilon por enskribi al F.F.E.A. novajn membrojn.

NEKROLOGOJ

=====

Ottavio LA MURA - Alia pioniro de nia fervoĵista movado forlasis nin. Ottavio La Mura, ĉefe elektroteknikisto ĉe Italaj Ŝtataj Fervojoj, mortis la 19-an de decembro 1971-a en Imola, kie li translokiĝis antaŭ monato ĉe sia filino Prof-ino Liliana. Li estis inter la fondintoj de nia Asocio kaj de la Esperanto-Grupo "A. Tellini" en Bologna. Dum sia restado en Forlì, li fondis tie novan Esperanto-Grupon. Dum lia fervoja kariero li deĵoris en diversaj urboj kie ĉiam propagandis nian movadon kaj lingvon. En Rivarolo kiel juna fervoĵisto, en la jaro 1922-a, li fondis kaj prezidis la lokan Esperanto-Unuiĝon. Li partoprenis en Torino, la 1-an de marto 1922-a, en la starigo de "Associazione Nazionale Ferrovieri Esperantisti", kiu aliĝis al Internacia Asocio de Fervoĵistoj-Esperantistoj kie sidejo estis tiam en Breslau. Poste li aktive propagandis nian aferon en Pistoia, Forlì, Bologna, Genova k.t.p.. Ni ploras nian longjaran fidelan amikon.

Italia GOGGI - Edzino de D-ro Vittorio Giuliarini. Ŝi kune kun la edzo, la filino Daria kaj aliaj gesamideanoj, fondis la Fervoĵistan Esperanto-Grupon en Porretta Terme ĉe la loka "Dopolavoro Ferroviario". Ŝi estis tuj tre entuziasma kaj agema pri nia movado kaj pri la lernado de nia lingvo. Ŝi estis ĉiam nobla ekzemplo por geamikoj de Porretta Terme por la daŭrigo de la laboro disvastigadi nian lingvon kaj movadon.

Laste ankaŭ D-ro Federico FACCHINI, fervoja kuracisto kaj membro de la sama Fervoĵista Esperanto-Grupo en Porretta Terme, estis tre trafita pro la morto de la patro.

KAV. Umberto SEGRE - Pioniro de la esperantista movado en Genova (Jaro 1910-a), estis persista disvastiganto de la lingvo kaj de la idealo pri homa interfratiĝo kunesence kun la internacia lingvo. Lastatempe kiel prezidanto de Genova Esperanto-Unuiĝo, li persone prizorgis ĝian informan bultenon. Ni memoras Liajn kortuŝajn kaj flamajn vortojn en la Aŭditorio de la Fojrejo en Genova okaze de la inaŭguro de la 41-a itala kongreso de Esperanto. Dum tiu manifestacio, la 19-an de septembro 1970-a, li ricevis ormedalon pro esperantista agado dum longaj jaroj.

Al ĉiuj familianoj la plej sincerajn kondolencojn de nia Asocio!

ESPERANTO EN LA RADIO

=====

RADIO ROMA - ESPERANTO - Casella Postale 320, I-00100 ROMA. La dissendoj okazas de h. 21,00 ĝis h. 21,20 (M.E.T.). Ondlongoj: M. 30,90 = kHz.9.710; m. 41,24 = kHz.7.275; m. 50,08 = kHz.5.990. Fakestro: D-ro Renato CORSETTI. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriere de Esperanto"; la unua parto al la ĉi-subaj temoj:

FEBRUARO 1971-a: 2295 dimanĉon la 7-an: Insulo S. George kaj Fondaĵo "Cini" en Venecio
2296 " " 14-an: La itala pentristino Rosalba Carriera
2297 " " 21-an: Italaj kanzonoj en Esperanto
2298 " " 28-an: Monto Granda Paradizo en la Alpoj.

PAROLAS VARSOVIO... - Programo de la dissendoj en Esperanto ĝis Majo 1971-a

Radio Varsovio disaŭdigas en la internacia lingvo du ĉiutagajn programojn:

6,00 h. - Ondlongoj: 41 m.; 49 m.; 200 m. = 16,30 h. - Ondlongoj: 19 m.; 25 m.; 31 m.
La horoj estas indikitaj laŭ mezeŭropa tempo. Aŭskultu niajn disaŭdigojn kaj aŭskultigu aliajn! Popularigu inter la neesperantista publiko la programojn de Pola Radio en la Internacia Lingvo. Skribu al: ESPERANTO-REDAKCIO, POLA RADIO, Poŝtkesto 46 VARSOVIO

I. F. E. A.
ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO

SIDEJO: DOPOLAVORO FERROVIARIO - BOLOGNA (ITALUJO)

SEKRETARIEJO: Via Donato Creti, n-ro 61 = I-40128 BOLOGNA (Italujo). Telefonnumero 35.90.71. C.C.Postale (Poŝtkonto) n-ro 8/24094.

-----ooooo0oooo-----

J A R R A P O R T O 1 9 7 0 - a

21. Landaj estraroj kaj funkciuloj

21.2. - ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "I.F.E.A.", Via Donato Creti, n-ro 61 I-40128 BOLOGNA (Italujo).

PREZIDANTO: Prof-ro D-ro Inĝ. Bernardino LATTANZI, Via Sebenico, 2 ROMA.

VICPREZIDANTO: D-ro Inĝ. Giordano AZZI, Via Giulio Cesare, 20 COMO.

SEKRETARIO: P.i. Germano GIMELLI, Via Donato Creti, 61 I-40128 BOLOGNA.

VICSEKRETARIO: D-ro Antonio DE SALVO, Via Olbia, 15 I-00182 ROMA.

KASISTO: S-ro Giulio CATENA, Piazza dell'Unità, 13 I-40128 BOLOGNA.

REDAKTORO KAJ KOMITATANO DE I.F.E.F.: P.i. Germano GIMELLI - BOLOGNA.

21.2.1. Kiom da membroj havas via landa asocio? n-ro 115.

21.2.2. Sur kiu labortereno laboras viaj membroj ĉe la fervojo? Preskaŭ sur ĉiuj sed oni ne povas precize scii.

21.2.3. Kiom da familianoj de membroj estas ano de via asocio? Multaj familianoj de fervojistoj estas membroj de nia Asocio.

21.2.4. Kiom da familianoj de membroj de via landa asocio estas esperantisto? Preskaŭ ĉiuj membroj de nia Asocio estas esperantistoj precipe se estas familianoj de fervojistoj.

23. Evoluo de rilatoj kun instancoj kaj aŭtoritatoj

23.1. - Kiaj estas la rilatoj al fervojaj instancoj? Bonegaj pere de D.L.F.

23.2. - Kiaj estas la rilatoj al sindikatoj? Ni komencas kontaktiĝi kun la Sindikatoj, la unuaj rilatoj estas bonaj.

23.3. - Kiaj estas la rilatoj al la centro de kulturaj organizaĵoj resp. FISAIC? Bonegaj pere de "Dopolavoro Ferroviario" kiu helpas nin ĉiurilate. Gravan helpon D.L.F., kiel Itala filio de FISAIC, donis, okaze de la organizo kaj disvolviĝo de la IFEF-Kongreso en Rimini. La estro de la Centra Oficejo de DLF D-ro Scodellari kaj la Prezidantoj de DLF en Bologna kaj Rimini S-roj Ceci kaj Spina, partoprenis kiel organizantoj al nia IFEF-Kongreso en Rimini kaj alparolis esperantlingve dum la inaŭgura manifestacio.

23.4. - Kiaj estas la rilatoj al kulturaj, artaj, libertempaj, sportaj fervojistaj organizaĵoj? La organizo kiu zorgas pri kulturo, arto, libertempo, sporto ĉe Italaj Ŝtataj Fervojoj estas "Dopolavoro Ferroviario". La Itala filio de FISAIC estas DLF kun kiu ni havas bonegajn rilatojn kaj ĉiutage kontaktojn. Kiaj estas rilatoj al aliaj fervojistaj organizaĵoj? Ni havas bonegajn rilatojn kun AEC (Association Européenne des Cheminots) kiu ofte publikigas en sia organo "EUROPA FERROVIARIA" artikolojn pri E. La Eŭropa Vicprezidanto D-ro Inĝ. De Rosa (kiu verkis fakprelegon por nia 22-a Kongreso) kaj la tuta estraro de tiu Asocio petis pli viglan kontakton kaj kunlaboron ne nur kun IFEA sed ankaŭ kun IFEF sur Eŭropa kampo. La sekretario de la Itala Sekcio de AEC partoprenis, kune kun diversaj membroj kaj estraranoj, al nia Kongreso en Rimini.

Ankaŭ la Eŭropa Interamikiĝo de Staciestroj interrilatis kun ni por stariĝi kontaktojn kaj kunlaborojn jam planitajn dum iliaj Internaciaj Kongresoj. Staciestroj Gugole el Verona kaj Motto el Avignon, reprezentis kaj parolis dum nia kongreso en Rimini en la nomo de tiu Interamikiĝo.

23.5. - Ĉu ekzistas rilatoj al ne-fervojistaj organizaĵoj, kiaj? Jes. Bonegajn rilatojn ni havas kun Itala Esperanto Federacio "I.E.F." kaj kun turismaj entreprenoj en Bologna kaj Rimini. Pere de niaj klopodoj la Provinca Turisma entrepreno de Bologna eldonis faldfolion pri la urbo en Esperanta lingvo kaj klopodis por ke la Turisma Entrepreno de Castel San Pietro Terme eldonu Esperantlingvan luksan buntan broŝuron; la restadeja Turisma Entrepreno en Rimini eldonis Esperantan tekston por ĝia broŝuro.

Dum la 22-a IFEF-Kongreso, en Castel S. Pietro Terme okazis inaŭguro de Zamenhof-strato danke al urbaj instancoj, favoraj al nia movado. La komunuma administracio de Ravenna, danke al vizito de la partoprenantoj al 22-a IFEF-Kongreso, dediĉis al D-ro L.L. Zamenhof belan straton en nova kaj loĝantplena urba kvartalo.

- 23.6. - Kion vi faras por plibonigi la sub punktoj 23.1 - 23.5 menciitajn rilatojn? Ni daŭrigas niajn personajn kontaktojn kaj uzas la influon de DLF, favore al nia movado por konvinki ĉiujn aŭtoritatojn kaj instancojn, helpi nin.

24. Kunlaboro/rilatoj kun aliaj esperantaj organizaĵoj

- 24.1. - Kiaj estas la rilatoj al via neŭtrala landa asocio? Kiamaniere okazas ev. kunlaboro? Kiam skribis antaŭe, la rilatoj kaj kunlaboroj kun I.E.F. estas bonegaj. Nia Vicpresidanto kaj nia Sekretario estas estraranoj de IEF. Ni kunlaboras kun la aliaj Esperanto-organizaĵoj por subteno de la leĝpropono n-ro 1489 por enkonduko de Esperanto en la Italajn lernejojn.

- 24.1.1. Bonvolu listigi ĉiujn viajn membrojn kiuj estas individua membro de UEA. N-ro 35 niaj membroj estas individuaj membroj de UEA sed por listigi ilin kun adreso necesas specialan enketon kiu postulas longan tempon.

- 24.1.2. Se ĝis nun ne estas en la ĉefurbo kaj en pli gravaj fervojaj nodoj UEA-fakdelegitoj fervojistaj kiel intencas solvi la problemon via landa organizaĵo? En la ĉefurbo (Romo) kaj en Bologna, Genova, Milano kaj Torino, ekzistas UEA-fakdelegitoj fervojistaj. Kie ne ekzistas ni instigos kaj proponos al IEF, niajn anojn. Multaj niaj membroj estas Delegitoj aŭ Videlegitoj kaj fakdelegitoj sed ne por fervojo.

- 24.2. - Kiaj estas la rilatoj al via landa asocio aŭ grupo de SAT? Kiamaniere okazas kunlaboro? Laŭ mia scio en Italio ne ekzistas landa asocio aŭ grupo de SAT.

- 24.3. - Ĉu vi havas kontakton kun aliaj landaj esperanto-organizaĵoj (kiaj?) kaj ĉu ekzistas kunlaboro? En Italio ĉiuj esperanto-organizaĵoj laboras en la kadro de IEF kaj ni kiel faka Asocio de IEF kunlaboras kun ĉiuj.

25. Informado en plej vasta senco

- 25.1. - Kiom da malfavoraj artikoloj aperis en viaj naciaj gazetoj? Neniu.

- 25.2.0. Kiom da artikoloj estas publikigitaj pro via interveno aŭ dissendo de informoj al la gazetaro? Proksimume 30 (preskaŭ ĉiuj rilatis la preparon, organizadon kaj disvolviĝon de IFEF-Kongreso en Rimini).

- 25.2.01. Kiom ofte vi uzis la kongresan gazetaran bultenon por verkado de viaj raportoj? Ĉiam.

- 25.2.02. Ĉu vi havas rimarkigojn rilate kongresa gazetara bulteno sub punkto 25.2.01? Ne. 25.2.1. Publikigo de fakaj prelegoj resp. resumoj.

- 25.2.1.1. Kiom ofte estas publicita la fakprelego de Rimini? Neniam. En raportoj la fakprelego estis menciita en n-ro 10 esperanto revuoj, en n-ro 5 fervojaj revuoj kaj dekoj de aliaj gazetoj.

- 25.2.1.2. Kiom ofte estas publicita la fakprelego UK-Vieno? Neniam.

- 25.2.1.3. Ĉu laŭ viaj scioj okazis fakprelego pri fervoja aŭ pri IFEF-aferoj dum aliaj kongresoj (SAT, ktp.) aŭ seminarioj? Ne

- 25.2.2. Ĉu vi sendis informojn al fervoja administracio? Kiom ofte? Kiamaniere ĝi reagis? Ĉu vi sendis informojn al sindikatoj? Ni sendas regule nian informan bultenon al dekoj de fervojaj aŭtoritatoj, same al multaj Prezidantoj de DLF. La Ĝenerala direkcio presis propagandan broŝuron esperantlingve kaj daŭrigis la uzadon de Esperanto en la horaro. La Ĝenerala Direktoro mem akceptis partopreni en la Honora Komitato de la 22-a IFEF-Kongreso. Kiel promesis en Rimini, la Ĝenerala direkcio, pere de D-ro Scodellari, sendis al ĉiuj Prezidantoj de DLF, al ĉiuj Departement-estroj kaj al ĉiuj Departementaj Delegitoj pri Kulturo, la cirkuleron de 7-10-1970-a, por propagandi nian movadon inter la fervojistoj. Tiu cirkulero inter alie diras: "ankoraŭ foje mi substrekas la neceson kaj utilon de la uzado de Esperanto. Tiu ĉi internacia lingvo celas helpi la interkompreniĝon inter la homoj de ĉiuj landoj, ĉu en la ama ĉu en la kampoj de kulturo kaj turismo".

- 25.2.3. Ĉu okazis aparta/speciala informado en la deĵorejoj? Jes, pere de afiŝoj kiuj reklamas niajn kursojn kaj niajn kongresojn. Sekve de la cirkulero supre indikita, multaj Departement-estroj instigis, per aparta deĵora-ordo, la fervojistojn aliĝi al nia movado.

- 25.2.4. Kiom da nacilingvaj radioprelegoj aŭ informoj de televido pro via kunagado aŭ iniciato okazis? Neniù. Okazis nur informoj de radio.
- 25.3. - Ĉu vi organizis ekspozicion? Kiom da vizitantoj proks? En Venecio okaze de la starigo de nova Esperanto-Grupo "La Gondolo" okazis malgranda ekspozicio, en la sidejo de DLF, vizitata de preskaŭ 150 personoj. Kunlabore kun la loka grupo en Bologna, okaze de la disdono de la diplomoj ni organizis malgrandan ekspozicion kun esperantaj libroj, gazetoj kaj broŝuroj. Ĉeestis pli ol 150 personoj.
- 25.4. - Kiom da priesperantaj afiŝoj, flugfolioj, varbbroŝuroj aŭ aliaj informiloj vi dissendis, disdonis aŭ disvendis? Krom la afiŝoj elmontritaj en la deĵorejoj kaj stacidomoj, ni havas en la centro de multaj urboj montrofenestrojn en kiuj ni montras propagandilojn pri nia movado faka kaj ĝenerala. Dum la jaro, kunlabore kun la lokaj grupoj, ni disdonas plurmilojn da nacilingvaj faldfolioj oportune presitaj por propagandi nian lingvonkaj movadon. Aparte menciinda la amasa disdono de propagandiloj dum la 22-a IFEF-Kongreso.
26. Junulara agado kaj aktiveco. Ĉu okazis ŝanĝoj kompare al la lastjara raporto? Neniu rimarkinda ŝanĝo. Pli boniĝis la interrilatoj inter IFEA-Junularo kaj la itala sekcio de TEJO, kiu estas fakasocio de "Itala Esperanto-Federacio".
27. Varbado.
- 27.1. - Kiamaniere okazis kaj rezultis la varbado de novaj membroj? Kiamaniere IFEF povos subteni vian laboron rilate varbado? Ĉu vi havas ideon kiamaniere oni povus intensigi kaj plisukcesigi la varbadon? Ni varbas novaĵn membrojn unue pere de kursojn kiujn ĉiujare ni organizas; due farante propagandon ĉiam, ĉie; trie sendante nian Bultenon kaj eventuale ankaŭ "Internacia Fervojisto", al multaj fervojistoj kiuj simpatias por nia movado, kiujn ni opinias iĝos estontaj membroj. Necesas ke "I.F." publikigu pli facile niajn anoncojn. Ankaŭ pere de elmontro de la kolekto de Esperantaj poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj de la IFEF-Kongresoj, dum la ĉiujaraj Naciaj Ekspozicioj de Fervojistoj Filatelistoj, ni klopodas diskonigi nian movadon inter la fervojistoj kaj fervojaj aŭtoritatoj. IFEF povas helpi nin sendante pli da ekzempleroj de "Internacia Fervojisto", por uzi ilin kiel propagandiloj.
- 27.2. - Kion vi faras por enkonduki Esperanton en la fervojistaj lernejoj? Ni organizas ĉiujare (kiam kaj kie estas eble) kursojn ĉe la Profesiaj Lernejoj de Ŝtataj Fervojoj, kiuj montras la taŭgecon de la uzado de nia lingvo.
28. Terminara laboro. Bonvolu koncize raporti pri via terminata aktiveco:
Laboro daŭrigas bone. Ni antaŭvidas presigi la Fervojan Terminareton "Italan-Esperantan" kaj "Esperantan-Italan" je la fino de la jaro 1971-a.
101. Diversaĵoj.
En Venezia danko al la klopodoj de Staciestro S-ro Tarlindano kaj de D-ro Boschin kaj S-ro Ferrero, kun la helpo de loka "Dopolavoro Ferroviario" oni starigis Fervojistan Esperanto-Grupon "LA GONDOLO", kiu organizis Esperanto-kursojn en diversaj lokoj kaj sekciojn Esperanton en la Biblioteko de DLF. Multaj niaj membroj agas en la Kulturaj sekcioj de DLF, precipe en Roma, Venezia, Vicenza, Verona, Genova, Bologna kaj cetero.

Bologna, la 10-an de februaro 1971-a

LA SEKRETARIO DE I.F.E.A.
(p.i. Germano Gimelli)